| Matthias Claudius,<br>**Abendlied** | Matthias Claudius,<br>**Vespera kanto** | Matthias Claudius,<br>**Vespera kanto** | Matthias Claudius,<br>**Vespera kanto** | Matthias Claudius,<br>**Vespera kanto** | Matthias Claudius,<br>**Vespera kanto** |
|---|---|---|---|---|---|
| | *tradukita de Adolf Burkhardt* | *tradukita de Guido Holz* | *tradukita de Otto Bonte* | *tradukita de Joachim Gießner* | *tradukita de Manfred Retzlaff* |
| 1. Der Mond ist aufgegangen,<br>Die goldnen Sternlein prangen<br>Am Himmel hell und klar;<br>Der Wald steht schwarz und schweiget,<br>Und aus den Wiesen steiget<br>Der weisse Nebel wunderbar. | 1. Leviĝas luno; hele<br>orpompas surĉiele<br>la steloj al l'okul'.<br>Arbaro mute revas;<br>el la herbej' sin levas<br>mirinde blanka la nebul' | 1. La luno nun ekhelas,<br>Steletoj oraj belas<br>En la ĉiela klar';<br>L'arbaro nigra revas,<br>Kaj el herbejo levas<br>Mirige sin nebula mar'. | 1. La luno jam leviĝis,<br>Steletoj ekheliĝis,<br>Ravante homojn nin;<br>Silentas la arbaro<br>Kaj super la kamparo<br>Nebulo pala levas sin. | 1. La luno jam leviĝis,<br>steletoj ekheliĝis,<br>ravante homojn nin.<br>Silentas la arbaro<br>kaj super la kamparo<br>nebulo pala levas sin. | 1. La luno nun leviĝis,<br>La steloj eklumiĝis,<br>Subiĝis jam la sun'.<br>Silentas la arbaro<br>Kaj super la kamparo<br>Nebulo blanka kuŝas nun. |
| Wie ist die Welt so stille<br>Und in der Dämmrung Hülle<br>So traulich und so hold!<br>Als eine stille Kammer,<br>Wo ihr des Tages Jammer<br>Verschlafen und vergessen sollt. | 2. Ripozas mont' kaj valo<br>sub la krepuskvualo<br>trankvile kvazaŭ lag'.<br>Por vi jen la permeso<br>fordormi en forgeso<br>la malbonaĵojn de la tag'. | 2. Silenta estas mondo<br>Kaj en krepuska rondo<br>Hejmecas kun favor'!<br>Similas kalman ĉelon,<br>En kiu vi kverelon<br>De l'tago dorme pelu for. | 2. Ho, mondo la kvieta,<br>Kaj kiel ŝajnas eta<br>Krepuska en kovril';<br>Por ke vi en ĉambreto<br>Samkiel infaneto<br>Senzorge dormu en lulil'. | 2. Neniu vento blovas,<br>la mond' ne plu sin movas<br>sub paca, klara lun'.<br>Nun petu noktan benon,<br>de l'tago la ĉagrenon<br>dormantaj vi forgesu nun. | 2. La mondo ŝajnas kiel<br>Hejmeca ĉambro, tiel<br>Trankvila estas ĝi.<br>Dormante ĉiun penon,<br>Aflikton kaj ĉagrenon<br>Dum nokta hor' forgesu vi.[3] |
| ... | ... | ... | ... | ... | ... |

[3] alia versio:
2.) Aĥ, kiel trankvileca
La mondo kaj hejmeca
Vespere estas ĝi!
En tiu kalma paco
Ekdormu vi pro laco,

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 2. Seht ihr den Mond dort stehen? -<br>Er ist nur halb zu sehen<br>Und ist doch rund und schön!<br>So sind wohl manche Sachen,<br>Die wir getrost belachen,<br>Weil unsre Augen sie nicht sehn. | 3. La luno nur duone<br>Prezentas sin impone;<br>ĝi tamen estas sfer':<br>Facile ni priridas<br>aferon, se ni vidas<br>nur parton de la plena ver'. | 3. Ĉu vi la lunon konas?<br>Aspekto nur duonas,<br>Sed rondas ĝi en bel'.<br>Do ankaŭ estas multo,<br>Loganta al insulto,<br>Okulojn ĝenas la malhel'. | 3. Rigardu nun la lunon,<br>Vi vidas nur duonon,<br>Sed tamen ronda ĝi.<br>Ni ofte ion ridas,<br>Ĉar ni ne klare vidas,<br>Ke ĉie regas harmoni'. | 3. Jen luno sur ĉielo<br>en brila ronda belo<br>duon-videbla nur.[4]<br>Ĉar multon ni ne vidas,<br>ni ofte ĝin priridas,<br>malsaĝe juĝas kun plezur'. | 3.) Jen staras ĉe l' ĉielo<br>Tre eta fora stelo,<br>Sed tamen egas ĝi!<br>Ja estas ofte aĵo<br>Por ni nur ridindaĵo;<br>Ĉar ne videblas ĝi al ni. |
| 3. Wir stolze Menschenkinder<br>Sind eitel arme Sünder<br>Und wissen gar nicht viel;<br>Wir spinnen Luftgespinste<br>Und suchen viele Künste<br>Und kommen weiter von dem Ziel. | 4. Homidoj ni fieraj<br>pekuloj nur, mizeraj;<br>ne multon scias ni.<br>Ni teksas iluziojn<br>kaj serĉas multajn sciojn<br>kaj devojiĝas pli kaj pli. | 4. Ni homoj tiel vantaj<br>Ja estas nur pekantaj,<br>Malvasta nia sci';<br>Ĥimerojn ni eltrikas,<br>Ni multe artifikas<br>Kaj perdas celon pli kaj pli. | 4. ....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 4. ....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 4.) Ni homaj fieruloj,<br>Mizeraj ni pekuloj,<br>Malmulton scias ni!<br>Ni faras multajn aĵojn<br>Kaj artajn elpensaĵojn,<br>Sed vana estas tio ĉi. |
| ... | ... | ... | ... | ... | ... |

Forgesu la aflikton vi!

[4] S-ro Gießner unue tajpis: duona tamen nur.

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| 4. Gott, laß uns dein Heil schauen,<br>Auf nichts Vergänglichs trauen,<br>Nicht Eitelkeit uns freun!<br>Laß uns einfältig werden<br>Und vor dir hier auf Erden<br>Wie Kinder fromm und fröhlich sein! | 5. Ho Di', nin lasu vidi<br>la Savon, ne plu fidi<br>vantaĵojn de l' pasem'!<br>Nin faru simplanimaj,<br>infane Diotimaj<br>en ĝoj', jam nun sen zorga trem'! | 5. Vidigu, Dio, savon,<br>Pasem' ne veku ravon,<br>Ne ĝoju ni pro glor'!<br>Fariĝu malafektaj<br>Ni kaj al vi respektaj,<br>Infane gaju nia kor'! | 5.<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 5.<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 5.) La Dian savon vidu<br>Ni nur kaj ni ne fidu<br>je vanta iluzi'!<br>Ni malfieraj iĝu,<br>Ni ĝoju kaj piiĝu,<br>Infan-egalaj estu ni! |
| 5. Wollst endlich sonder Grämen<br>Aus dieser Welt uns nehmen<br>Durch einen sanften Tod!<br>Und, wenn du uns genommen,<br>Laß uns in Himmel kommen,<br>Du unser Herr und unser Gott! | 6. Vi fine, sen ĉagreni,<br>el mond' nin volu preni<br>per milda morto for.<br>Nin tiam al ĉielo<br>venigu, al la celo:<br>Vi, nia Dio kaj Sinjor'! | 6. Vi gracu, sen ĉagreni<br>El mondo nin forpreni<br>Al fin' per milda mort'!<br>Kaj post forpren' fidele<br>Hejmigu nin ĉiele,<br>Sinjoro, Dio, nia fort'! | 6.<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 6.<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>....................<br>.................... | 6.) Finfine vi nin prenu<br>El tiu mond', ĉagrenu<br>Ni ne pro tio ĉi!<br>Kaj kiam vi nin prenos,<br>Ho faru, ke ni venos<br>En vian regnon, kara Di'! |
| ... | ... | ... | ... | ... | ... |

6. So legt euch denn, ihr Brüder,
In Gottes Namen nieder;
Kalt ist der Abendhauch.
Verschon uns, Gott! mit Strafen,
Und laß uns ruhig schlafen!
Und unsern kranken Nachbar auch!

...

7. Gefratoj, nun ekkuŝu!
Vin nokta vent' ne tuŝu,
dum ŝirmas anĝelar'.
Indulgu, Di', nin grace,
por ke nun dormu pace
ni kaj malsana la najbar'.

...

7. Kuŝiĝu do kun pio
Vi en la nom' de Dio,
Jam fridas nokta vent'.
Per punoj, Di', ne ĝenu,
Per dolĉa dorm' nin benu,
Najbaron ankaŭ en turment'.

...

7. Ekkuŝu nun, gefratoj,
De bona Di' ŝirmataj
Kun tuta la homar'.
Kar-Dio ne nin punu,
Trankvilan dormon donu
Kaj al malsana la najbar'!

...

7. Ĉe l'fino de la tago
kuŝigu vin sen plago,
silentas la anim'.
Ne punu nian faron,
sed nin kaj la najbaron
dormigu, Dio, nun sem tim'.

...

7.) Gefratoj, enlitiĝu,
Trankvile endormiĝu!
Noktiĝas ĉie ĉi;
Vin gardos nia Dio.
Li regas super ĉio.
Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

...

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21).*

*Arg-394-776 (2012-12-24 20:31:03)*

*La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Johann Abraham Peter Schulz (31.03.1747 - 10.06.1800). Pri tiu vidu la retejon* `http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Abraham_Peter_Schulz`*. Vidu ankaŭ:* `http://ingeb.org/Lieder/DerMondi.html`*. Tie estas aŭdebla la meolodio. La muziknotoj troviĝas en* `http://www.liederprojekt.org/lied27783.html`*.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Adolf Burkhardt *(pastro, ∗1929-04-10 – †2004-04-02).*

*Arg-394-780 (2007-03-27 19:07:21)*

*Tiun ĉi tradukon mi, Manfred Retzlaff, prenis el la kant-libreto "Mia kantaro I", dua eldono de Majo 1998, kompilita kaj eldonita de s-ro Josef Schiffer, Wilstorfstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio. Sinjoro Josef Schiffer donis al mi la permeson.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Guido Holz *(∗1920 – †1989).*

*Arg-394-778 (2007-03-26 12:53:22)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 14 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Guido Holz la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de Otto Bonte.*

*Arg-394-779 (2007-03-26 22:31:58)*

*Tiu ĉi traduko estas publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", sur paĝo 15 de la numero 6/984. Mi, Manfred Retzlaff, detajpis la tradukon el tiu, en 2007-03-26. Enigis la tradukon de Otto Bonte d-ro Dirk Willkommen, la tiama redaktisto de "Esperanto aktuell!", .*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Joachim Giessner *(∗1913-12-23 – †2003-11-25).*

*Arg-394-782 (2007-03-28 09:55:34)*

*Mi, Manfred Retzlaff, detajpis tiun tradukon de Joachim Gießner el folio kun letero, kiun skribis al mi en 1987-11-24 s-ro Joachim Gießner. Li skribis en tiu letero, ke la fakto, ke lia traduko de la unua strofo estas tute la sama kiel en tiu de Otto Bonte, estas hazardo kaj ke li ne sciis antaŭe la tradukon de Otto Bonte.*

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de* Matthias Claudius *(∗1740-08-15 – †1815-01-21) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 1989-09-10.*

*MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)*

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en "Esperanto aktuell 6/1984".*